August Heinrich Hoffmann,

Alveno de l' printempo

tradukita de Manfred Retzlaff

Ree nun verdiĝas ĉio
Sur herbejo kaj kampar'.
Kaj ekestas eŭforio
Anstataŭe de malklar'.
Jes, post vintra la sufero
Printempiĝas je la fin',
Regas ĝojo sur la tero,
Tio feliĉigu nin.

Vidu, tie papilio
Flugas en printemp-ornam',
Ĝi anoncas, ke nun ĉio,
Kio mortis, vivas jam.
Nur violoj rigardantaj
Jen timeme al la sun'
Estas kvazaŭ demandantaj :
« Ĉu printempas vere nun ? »

Vidu, la alaŭdoj tie
Super ni en la aer' !
Ili kantas idilie
Por ni sube sur la ter' !
Nun forfuĝas la sufero,
Printempiĝas ĉie ĉi –
Printempiĝas sur la tero
Ankaŭ en la brust' al ni !

Traduko de la Germana poemo "Frühlings Ankunft" de August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2011-01-25.*

MR-522-1 / Arg-848-1712 (2013-02-28 19:14:46)

August Heinrich Hoffmann,

Frühlings Ankunft

Grüner Schimmer spielet wieder
Drüben über Wies' und Feld.
Frohe Hoffnung senkt sich nieder
Auf die stumme trübe Welt.
Ja, nach langen Winterleiden
Kehrt der Frühling uns zurück,
Will die Welt in Freude kleiden,
Will uns bringen neues Glück.

Seht, ein Schmetterling als Bote
Zieht einher in Frühlingstracht,
Meldet uns, dass alles Tote
Nun zum Leben auferwacht.
Nur die Veilchen schüchtern wagen
Aufzuschau'n zum Sonnenschein;
Ist es doch, als ob sie fragen:
»Sollt' es denn schon Frühling sein?«

Seht, wie sich die Lerchen schwingen
In das blaue Himmelszelt!
Wie sie schwirren, wie sie singen
Über uns herab ins Feld!
Alles Leid entflieht auf Erden
Vor des Frühlings Freud' und Lust –
Nun, so soll's auch Frühling werden,
Frühling auch in unsrer Brust!

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19).*

Arg-848-1711 (2013-02-28 19:11:34)